

# REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ

66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS

## Protokolo de la Administra Kunsido de la 3a de majo 2003

(æe 12 rue des Fossés-St-Jacques, PARIS-5<sup>a</sup>)

### Æeestantoj :

Daniel Durand, Prezidanto  
Liliane Metz-Krencker, Øenerala Sekretariino  
Basile Ginger, Kasisto,  
Geneviève Charpentier, Peter Davidse, Jean-Claude Loewinski, René Marlin, Claudius Schauffler, Dorothea Sheasby, membroj de la Administra Konsilantaro.

### Observantoj :

Joël Luguern, Thierry Toulon, membroj de Registrolibro, Jerry Bourgeois, Henri Cainaud, Troy Davis, Bernard Henry, Didier Marchand, Bernard Muet, Jean Prédine, Jean-Michel Richard, Harold Surderman, Christa Werner, kaj dek kvin aliaj Mondcivitanoj.

Senkulpiøintoj : Amel Djemai, Claudine Fischer, David Foncho, Andrée Gaymard-Rollet, Ursula Grattapaglia, Aimé Ruzuba Bizimwa, Jean Verstraeten, membroj de la Administra Konsilantaro.

Kunsida prezidanto : Daniel Durand  
Kunsida sekretario : Bernard Henry.

La kunsido malfermiøis je 9 h 40.

## 0. Memorigo pri Guy kaj Renée Marchand

La Prezidanto rememorigas nian karan kamaradinon kaj amikinon Renée Marchand, forpasintan la 5an de junio 2002, kaj samtempe omaøas la memoron de Guy Marchand pri kiu venas la dekjariøo de lia forpaso.

Ambay dediøis sian vivon al la antaøenpuøo de la mondcivitaneco kaj fervoris por konstrui tutmondan demokration per kreado de pluraj institucioj : Kongreso de la Popoloj, Instituto pri Tutmondismaj Studoj, gazetagentejo AMIP, Monda Fonduso de Solidareco Kontraø la Malsato, ktp.

Æe la Mondcivitanoj nenio plu estos kiel en la tempo de Renée, kaj tiu kunveno de la Administra Konsilantaro devas kuraøi pri la necesaj rearanøoj por la daørigo de la laboro, kiun ili entreprenis antaø pli ol 50 jaroj. Tio estas la plej taøga omaøo, kiun ni povas fari al Renée kaj Guy.

## 1. Kio estis farita ekde la lasta Administra Konsilantaro

### 1.1. De la plenuma taømento :

1. **Renovigo de la lokalo :** la jaro 2002 kaj la komenco de 2003 estis markitaj per la konsistigo de la administra dosiero antaøa al la refarado, kaj per la øuste nomitaj laboroj. La konstrupermeson ni ricevis fine de decembro 2002. La laboroj estis realigitaj la 3an kaj 4an de marto koncerne la fasadon, kaj komence de aprilo koncerne la refaron de la internaj lignaøoj. La suma kosto de la refarado proksimumas 10.000 € La Mondcivitana Registrejo nun disponas pri lokalo kun pli agrablaj fasado ebliganta bonkvalitajn ekspoziciojn. La Administra Konsilantaro dankas al Jean-Michel Richard pro la adjudikado, al Jean Prédine pro la konsistigo de la dosieroj kaj al Daniel Durand pro la kromaj laboraøoj, la prizorgado kaj la gvidado de la laboroj.

2. **Studaj Tagoj en Dabo, 27, 28 kaj 29aj de septembro 2002.** Kaj la forpaso de Renée Marchand kaj ankaø diversaj cirkonstancoj instigis Daniel Durand kaj

Liliane Metz organizi Studajn Tagojn pri Mondcivitaneco. Estis invitataj responsantoj pri registrado el Svisio, Germanio, Francio kaj ankaø Geneviève Charpentier pro la Esperantista Internacia Centro, kaj kelkaj aliaj tutmondistoj. Tiuj Studaj Tagoj kondukis interalie al la konsistigo de "Subtena Komitato al la Kongreso de la Popoloj". Protokolo estas disponebla en franca kaj angla.

3. **Kunveno de la Subtena Komitato al la Kongreso de la Popoloj.** Diøono, la 15an kaj 16an de marto 2003 : La Komitato konsistigita dum la Dabo-aj Tagoj kunvenis por taksii la situacion de la Kongreso de la Popoloj sekve de la forpaso de øia sekretariino Renée Marchand. Kalendaro estis difinita por kunvenigi sesion de la Kongreso de la Popoloj fine de oktobro 2003 en Parizo. Proponoj estis faritaj por revizii la Internan Regularon. La anstataøa sekretariato estos plenumata de la Prezidanto de la Mondcivitana Registrolibro. Ankaø protokolo de tiu kunveno estas disponebla en franca kaj en angla.

### 1.2. De la Registrocentroj kaj Korespondantoj :

(estas æi tie indikitaj nur la agadoj, kiuj estis konstatitaj aø raportitaj al la Registrolibro.)

**Albanio.** Adriana Gjika, Korespondantino en Vlore, albanigis la paøon "Al mondaj problemoj, tutmondaj solvoj", kiuj oni de tiam trovas en Interreto.

**Aøtralia.** Christopher HAMER, Korespondanto en Sidnejo, strebis, kun helpo de Liliane Metz-Krencker, kiu tie trapasas æiujare plurajn monatojn, por malfermi registrocentron. Kunveno organizita de ili en la Instituto pri Internaciaj Aferoj en Sidnejo, por diskonigi mondcivitanekon havis viglan sukceson, pro la partopreno de pli ol cent homoj. Christopher HAMER, universitata profesoro, kreis en sia laborejo asocion de mondcivitanoj en kiu li varbis plurajn el siaj propraj studentoj. Nun dek ses homoj animas la estontan Sidnejan Registrocentron.

**Belgio.** Jean VERSTRAETEN, Korespondanto por Flandrio kaj Nederlando, eldonas bultenon trifoje æiun jaron, la lasta eldonaøo datiøas de januaro 2003. Li enregistris kvin novajn Mondcivitanojn.

**Burkinio.** Ankaø Souleymane DRABO, Korespondanto en Vagaduguo, enregistris kvin novajn mondcivitanojn. Dum lasta marto li partoprenis en manifestacio kontraø la milito en Irakio.

**Brazilo.** Muriel SARAGOUSSI, Korespondantino, elektita Delegitino al la Kongreso de la Popoloj forlasis la urbon Manaus por Braziljo, kie ŝi nun postenas æe la Ministrino pri Medio por la venontaj kvar jaroj. Niaj gratuloj al Muriel, sed bedaørinde ŝia disponebleco por ni nepre malpliøos.

Ursula GRATTAPAGLIA, Korespondantino en Alto Paraiso, Anstataøa Delegitino al la Kongreso de la Popoloj, enregistris kvin novajn mondcivitanojn kaj projektas la kreadon de Monda Domo en sia urbo Alta Paraiso de Goias, kie estos prezentataj Unesko kaj Registrolibro de la Mondcivitanoj, kaj kiu realiøos dank'al la helpo de Rotaria klubo.

**Kanado.** La Kanada Registrocentro eldonis la numerojn 11 kaj 12 de sia informilo "Newsletter". La Administra Konsilantaro kunvenas dek fojojn æiujare kaj organizas

diskutojn en grupoj. La 21an de septembro 2002, la Registrocentro okazigis sian Ĝeneralan Asembleon kaj sendis al Parizo la protokolon por la periodo de julio 2001 ĝis junio 2002.

**Kongio** (D.R.) Registrocentro de Kalonge (Sud-Kivuto) : dek-du novaj Mondcivitanoj estis enregistritaj. Nun la loka situacio estas tre maltrankviliga pro la daŭrigo de la konfliktoj en tiu Lagega Regiono.

En Kinshasa, Faustin SHETA MIKAYELE entreprenis revigligi la Registrocentron de Kinshasa. Pluraj kunvenoj okazis. La Centro faris kvar novajn enregistraĵojn.

**Svisio.** *En Romandio*, la Registrocentro en Ogens, fondita fine de la Ĝenerala Asembleo de 2002 en Parizo, realigis kelkajn novajn enregistraĵojn. Ĝi partoprenis en la kontraŭnuklea manifestacio en Strasburgo (oktobro 2002) kaj en pluraj manifestacioj kontraŭ la milito en Irakio. La Registrocentro entreprenis konsultadon ĉe ĉiuj mond-civitanoj enregistritaj en franclingva Svisio. Kunveno estas projektita por la 13a de septembro 2003 en kiu Liliane Metz reprezentos la Registrolibron.

Nia Korespondanto Claudius SCHAUFFLER ankay prezidas mond-civitanan asocion en germanlingva Svisio. Tiu asocio kreis novan ttt-ejon : [www.wolrdcitizens.ch](http://www.wolrdcitizens.ch). *"Svisaj Mondcivitanoj estis tre agemaj ĉi tiun jaron kontraŭ la milito en Irakio. La peticio, kiun ni lanĉis kolektis 6000 subskribojn."* 3 enregistraĵoj en 2002.

**Kamerunio.** Peter MBUNTA, Korespondanto por la anglalingva Kamerunio en Douala, estis arestita de la polico dum mond-civitana kunveno, kiun li organizis en septembro 2002. Ni ne konas la kialon de lia aresto. La provoj de komunikado kun aliaj mond-civitanoj de la Douala regiono ne sukcesis. La demando estas metita ĉu ni ne devus raporti pri lia malapero al Internacia Amnestio, aŭ ĉu organizi la mond-civitanon por ke ili povu mem interveni en tiaj okazoj. Joël Luguern kaj Didier Marchand sin devontigas studi la aferon.

**Germanio.** Inge GRZYB, Korespondantino en Magdeburg enregistris kvar novajn mond-civitanon.

Inge Grzyb (Magdeburgo) kaj Barthold Olbers (Hamburgo) ĉeestis la Studajn Tagojn en Dabo. Krome Christa Werner (Hamburgo) konsentas fari ĉi dispona al la Registrolibro, laŭ difinitaj kondiĉoj.

**Francio.** Joël Luguern helpata de Thierry Toulon kaj de Didier Marchand, sub la prezidanteco de Basile Ginger, transprenis la torĉon post la forpaso de Renée Marchand. La nova taĉmento sukcesegis regule plu eldoni la bultenon *"Citoyens du Monde"*. 220 enregistraĵoj en 2002. Granda gratulo por tiu vicleco.

**Ganao.** Karl Kpodo, Korespondanto en Accra (Akro) faris 7 enregistraĵojn en 2002.

**Hindio.** La D-ro Leo Rebello konsentis fari ĉi korespondanto de Registrolibro (3an de aŭgusto 2002). *Invitite al tiu ĉi Administra kunveno, li lastmomente nulgis sian vojaĉon pro sanaj kialoj.*

**Italio.** Francesco d'Ingiullo (Frisa) konsenti fari ĉi korespondanto de la Registrolibro (3an de februaro 2003). Pluraj dokumentoj en Itala estis presitaj kaj publikigitaj en Interreta TTT-ejo.

**Japanio.** Masaji Ie sendis al ni la informilojn n° 41 kaj 42 en japana kaj angla, kaj ankaŭ la kontribuon de la Centro al la Registrolibro.

**Komoroj.** Agado por la monda civitaneco estigis 4 enregistraĵojn. La homo esperita por fari ĉi korespondanto nun estas nedisponebla. La kontaktoj pluas.

**Luksemburgio.** Goulhora Souldanova subskribis en Dabo sian konsenton por fari ĉi korespondantino de Registrolibro en Lusemburgo. Dank'al helpo de Joseph Peschon ĉi ĉi eldonis novajn dokumentojn.

**Esperantista Internacia Centro.** Geneviève CHARPENTIER klarigas, ke ĉi ne povis pasintjare partopreni en la esperantistaj kongresoj. ĉi faris nur ses novajn enregistraĵojn.

**Sidejo de la Registrolibro.** Krom la administraj funkcioj, la Registreja lokalo certigas lokan informadon por la ĉirkayaĵo tre kosmopolita en tiu kvartalo de Parizo, kun grava pasado interalie pro la proksimeco de la hospitalo "Pitié-Salpêtrière". Pajnas, ke la nova fasado, videbla ekde la aera metroo estas tre alloga por la veturantoj, kiuj poste piediras por viziti nin.

## 2. FINANCOJ

### Bilancio de la jaro 2002

Basile Ginger prezentas la financon bilancon de 2002.

#### ENSPEZOJ

Individuaj kontribuoj :	3 126,23 €
Kontribuoj repagitaj de la Centroj:	291,76 €
Kontribuo de UPF (samlokalano):	2 744,09 €
Kartoj liveritaj de RCM.:	500,78 €
Kartoj venditaj al la Centroj :	1 769,00 €
Interzonoj :	587,74 €
Vendoj	53,30 €
Asekura repago de vitraĵo	628,32 €

**Sumo :** 9 711,22 €

#### ELSPEZOJ

Sekretariato :	2 180,00 €
Veturado :	1 546,28 €
Sekretariejaj aĉetoj :	49,18 €
Presado :	365,51 €
Poptmarkoj :	401,80 €
Telefono kaj Interreto :	523,65 €
Financaj kostoj :	15,22 €
Lokalo V.Auriol (kunposedo) :	782,34 €
Refaro de la lokalo :	3 750,50 €
Asekuroj, elektro, impostoj :	1 042,91 €
aliaj aĉetoj	8,00 €
Animadoj (Dabo)	259,00 €
Kunvenambro por la Asembleo	276,49 €

**SUMO :** 11 200,88 €

Negativa rezultato de la jaro 2002 : 1 489,66 €

## 3. - PARTOPRENO

### 3.1. Prezo de la karto.

La Ĝenerala Asembleo en 1990 en Ĝenevo fiksas la prezon de la Mond-civitana Karto je 80 FRF, t.e. 12,20 €. Inflacio kaj eŝrigo pravigas retaksadon kaj novan nulsimpligon. Laŭ unanimeco de la ĉeestantaj membroj de la Administra Konsilantaro estas decidite, ke post transiga periodo finiĝonta la 1an de januaro 2004, la oficiala prezo de la karto estos 15 €.

Oni rememorigas, ke en konsento kun la Estraro de la Mond-civitana Registrolibro, malpliigoj eblas laŭ landoj aŭ laŭ apartaj situacioj.

Oni ankay rememorigas, ke provizoraj atestiloj al enregistriĝo liverataj de la Registrejo ebligas trijaran pagon de la enregistrado.

### 3.2. Formato de la karto

Post ĝenerala interdiskuto, la modelo de la karto ĝajnas daŭre kontentigi plejparton de la kunvenantoj. Tamen ĝi estas farita el difektebla materio kaj ne kongruas kun la nova eŭropa formato de legitimilujoj. Oni proponas eksperimentan produkton de plastizita karto kun standardaj dimensioj. Tiu plastizita karto estus vendata iom pli koste (20 € ?). Alia propono estus reduktigo de la nuna karto okaze de estontaj presadoj. Neniu fina decido pri tio.

### 3.3. Kreado de Reto.

Francesco d'Ingiullo, Registrolibra Korespondanto en Frisa (Italio) sugestas al ni la kreadon de reto interliganta la konsentintajn mondĉivitanojn, kiu ebligus interĝanĝi ideojn kaj spertojn pri mondĉivitaneco, kaj ankaŭ reciprokajn gasteblecojn.

La Administra Konsilantaro sin deklaras favora al tiu kreado, sub kondiĉo ke tio ne estigos plian laboron por la estraranoj.

Animantoj estas do serĉotaj. Peter Davidse sin proponas por tiu tasko, sed nur post tempo de unu jaro kaj duono.

### 3.4. Listo da kompetentecoj.

Liliane Metz esprimas la deziron konsistigi liston, en kiu estus enskribitaj la diversaj kompetentecoj kaj ekspertizecoj sine de Registrolibro. Tiu listo povus esti ligita al la Reto. Pristudote.

## 4. Eldonado

La lasta eldono de la Registrolibra bulteno jam datumas de 3 jaroj. Daniel Durand sola plenumis la koncepton, la eldonon kaj la dissendadon. Ege necesas relanĝi la eldonon de la bulteno kaj trovi ties redaktanton. Petita, Bernard Henry konsentas pri tiu redakciado kaj koncepti la bultenan provaĵon. Daniel Durand transdonos al Bernard Henry la jam stokitajn skribaĵojn.

## 5. La Kongreso de la Popoloj

La Prezidanto rememorigas la iniciaton faritan en Dabo kaj la kunvenon en Diĵono (kf 1.1.-2,3). La Subtena komitato al la Kongreso de la Popoloj proponis sesion de Kongreso de la Popoloj por fino de oktobro 2003 en Parizo. La kunvokiloj estas senditaj kaj la respondoj ekvenas.

La financa aspekto estu preparolata. Ĝis nun la Franca Registrocentro sola portis la tutan financon ĝarĝon de

Kongreso de la Popoloj ĝar la paro MARCHAND ankaŭ multe fervoris ĝis la fino de sia vivo por ĝi. Necesas do restarigi interalie pri tiu punkto pli normalan funkciadon de Kongreso de la Popoloj, kiu donus al ĝi la bezonatajn vivrimedojn. Peter Davidse rekomendas financadon de Kongreso de la Popoloj mondscale fare de Mondĉivitana Registrolibro, kaj ne de tiu aŭ tiu ĝi landa Registrocentro. La triono transpagata de la Registrocentroj el la memvolaj kontribuoj estas destinata interalie al tiu financado. Plie Joël Luguern, por la franca Registrocentro, proponas lanĝi subskripcion ĝe la francajn Mondĉivitanojn pere de la franca bulteno.

## 6. Projektoj kaj diversaj ĝoj

### 6.1. Kvardekjariĝo de la "Alvoko de la 13"

En marto 2006, la Alvoko de la 13 kvardekjariĝos. Estus oportune marki tiun datrevenon per grandfaro. Ĝu nova deklaro ? Ĝu alia ideo ?

### 6.2. Listo de la tutmondiĝoj

La koncepto de tutmondiĝo de la komunumoj venas de Robert Sarrazac. Roger Volpelliĝre kaj Guy Marchand diligentis por konsistigi la liston de la milo da komunumoj, urboj, teritorioj, universitatoj, kiuj sin tutmondigis de post 1949 sekve de la urbo Cahors. El tiu listo konsistas la libro "*Tutmondiĝoj*". Ĝi estas nun konsultebla kaj ĝisdatigata sur la interreta TTT-ejo de la Mondĉivitana Registrolibro.

Tiu listo partoprenas en la konsistigo de la monda voĝdonantaro. La starigita demando temas pri la rajteco de la reganto de tiu listo. La pria debato ne ebligis sin klare determini. La afero estas prokrastita.

### 6.3. "Tutmonda Parlamento"

Liliane Metz kaj Bernard Henry entreprenis la francigon de la libro verkita de Christopher Hamer, *A Global Parliament*.

## 7. Fermo.

La tagordo ne povis elĝerpiĝi. Tamen la Prezidanto fermas la kunsidon de la Administra Konsilantaro, opiniante ke la aliaj punktoj, kiuj povos esti diskutataj dum la posttagmezo, ne necesigas tujan decidon de la Administra Konsilantaro mem.

La kunsido estas fermita je 12 h 45

# Registrocentroj kaj Korespondantoj de RCM

## Registration Centres and Correspondents of RWC

### Centres d'enregistrement et Correspondants du RCM

(lande ordigitaj laŭ la normo ISO 3166)

#### **Internacia Centro - International Centre**

Registre des Citoyens du Monde, 66 Bd Vincent  
Auriol, 75013 PARIS, France (Tel. 0145 8603 58)

#### **AL ALBANIO :**

Adriana GJIKA, Lagj "Dëshmorët", Rr "S.Zotaj", Pall  
1175, VLORE. (albana, français, english)

#### **AU AUSTRALIO**

Christopher HAMER, 34 Caravan Head Road,  
OYSTER BAY, NSW 2225 (english)

#### **BE BELGIO :**

Jean VERSTRAETEN, 65 Vredestraat, 2540 HOVE  
(nederlands)

Georgy CORNET, 105 A, rue Houckaye, 4800

ENSIVAL (français)

#### **BF BURKINIO :**

Souleymane DRABO, 01 BP 6368,

OUAGADOUGOU 01. (français)

**BI BURUNDIO :** Macaire BACAMURWANKO, BP

1253, BUJUMBURA. (français)

**BR BRAZILIO :** Ursula GRATTAPAGLIA, CP 37, BR

73.770-000 ALTA PARAISO GO (português,

Esperanto)

Tel./fakso 061 646 11 75

**CA KANADO :** World Citizens in Canada, Dorothea

F.M.SHEASBY, 688 Green Meadow Crescent,

MISSISSAUGA, ONTARIO L5A 2V2 (english)

#### **CD R.D.KONGIO :**

- Faustin SHETA MIKAYELE KK, (Français, Esperanto, Linguala)
- Aimé RUZUBA BISIMWA, (Butwashenge, Kalonge, Sud-Kivu) FCR, BP 470, CYANGUGU (Ruando) (Français, Kiswahili, Kinyarwanda)

#### **CH SVISIO :**

- Claudius SCHAUFFLER, Dorfhalde 4, CH 3612 Steffisburg (deutsch, français). Tel 41 33 437 17 83
- Citoyens du Monde, Case Postale, CH 1038 BERCHER (français)

**CI EBURIO :** DIARRA BAKOROBA, s/c M. PRAO

JOSEPH C R T, Colis postaux, **BOUAKE** 01

(français)

**CG KONGOLANDO :** Jean Pierre BERRI, BP 984,

BRAZZAVILLE, tel (242) 81 27 62 (français)

#### **CM KAMERUNIO :**

- David FONCHO, pa/ pr Chindji Kouleu, BP 1803 **YAOUNDE** (english, français, Esperanto)
- Peter MBUNTA, CGSA, BP 1213, BASSA - **DOUALA** (english, français)

**CZ ĈEĤIO :** Alena Cecháková, U lesa 768, CZ

73401 Karviná-Ráj (C'esky, français)

#### **DE GERMANIO :**

- Barthold OLBERS, c/o Myslik, Spliedtring, 49, 22119 HAMBURG (deutsch)

- Inge GRZYB, Fröbelstrasse 6, 39110 MAGDEBURG (deutsch, english)

#### **DZ ALĜERIO :**

- Mohammed Abdou DIB, 12 bd de la République, 22000 SIDI BEL-ABBES (français)
- Amel DJEMAI, Cité HLM, Place des Martyrs, Bt.B.n°8, CHERCHELL/TIPAZA (français)

**ES HISPANIO :** José-Maria CASAS-HUGUET, Rbla.

Llibertat, 94-101, 5è., ES 08800 VILANOVA I LA

GELTRU (kastilia, kataluna)

**FR FRANCO :** Citoyens du Monde, 15 rue Victor

Duruy, FR 75015 PARIS (français)

**GA GABONO :** Gervais Truffault M'BITA, Apt 281,

Likouala IV, 3 Ardt, B.P. 4846, LIBREVILLE

(Français)

**GB BRITIO :** Noel GLYNN, 97, Shakespeare Road,

Herne Hill, LONDON, SE24 OPX (français, english)

Tel 0207 652 0319

**GH GANAO :** KARL A.Y. KPODO, P.O. Box 6289,

ACCRA-NORTH (français, english)

#### **IN HINDIO :**

- PRASANNANSHU, 943, Block 34, D.D.A. Flats, Kalkaji, IN 110019 NEW DELHI (english)
- Leo REBELLO, 28/552 Samata Nagar, Kandivli East, IN 400101 MUMBAI (Bombay) (english)

**IT ITALIO :** Francesco D'INGIULLO, Badia di Frisa 8,

IT 66030 FRISA (Italiano, Français, Esperanto)

**JP JAPANIO :** Masaji IE, 1.2.17 Suzurendai,

Kitimachi Kita Ku, JP 651 11 KOBE (japana, english)

**LT LITOVIO :** Alfredas MARUSKA, pk 3329, LT 2013

VILNIUS (litova, Esperanto)

**LU LUKSEMBURGIO :** Goulнора SOULTANOVA,

BP 208, LU 2012 LUXEMBOURG. (english,

français, luxembourgeois)

**NL NEDERLANDO :** Peter DAVIDSE, van

Diemenstraat 26 H, 2518 VC DEN HAAG

Paul BERENDSEN, postbus 77846 NL 1070 LK

AMSTERDAM (nederlands, english)

**PL POLLANDO :** Pawel PETASZ, P.O.Box 68, PL

82300 ELBLAG (polska, english)

**RU RUSIO :** Georguy GONTCHAROV, Apt 307,

Oulitsa Tvardovskovo,31, MOSKVO (rusa, français)

**SE SVEDIO :** Gunnar EKEGARD, PO.Box 1213, SE

751 42 UPPSALA (svenska, norska)

**SN SENEGALIO :** Landing NIASSY, BP 20336,

DAKAR-THIROYE (français)

**US USONO :** Douglas MATTERN, 55 new

Montgomery street suite 224, SAN FRANCISCO CA

94105 (english)

**Esperantista Internacia Centro,** Geneviève

CHARPENTIER, 32 C rue Jean Perrin, FR 77190

DAMMARIE LES LYS (Francio) (Esperanto)